Socikultura bulteno
de Fokolar-movado

Vintro 2019

‘Nova Urbo‘

ni Pontu

Hodiaŭ ni prezentas kelkajn novaĵojn el diversaj partoj de la mondo. La dua artikolo pri Mahatma Gandhi povas estis ŝoka al homoj, kiuj nur surpraĵe konas lian agadon kaj, precipe, kulturan tradicion de la popoloj inter kiuj li vivis. Se vi legos tion, konsideru ĝin traduki kaj eble ankaŭ publikigi aŭ diskonikgi ĝin kiel printaĵo inter viaj konatoj. Per tradukado vi certe progreson en plibonigo de via lingvokono, eĉ se la unuaj provoj ne estos perfektaj. Specialistoj pri fremdlingaj studoj diras, ke oni pli facile lernas per ripetado de interesaj tekstoj. Tial ni invitas ĉiujn al nia “Traduk-rondeto” memore al Kabe, la unua stilomajstro de la Internacia Lingvo. Kuraĝu provi kaj la progreso sekvos! Tion ni bondeziras al ĉiuj, okaze de la nova jaro.

Nova ekonomio por ĉiuj

Nuntempe la mondo alfrontas ekologian kaj socian krizon. Klimataj ŝanĝoj kaj kreskanta malegaleco okazas i.a. pro maljustaj ekonomiaj strukturoj, miopa politiko kaj malnoviĝintaj praktikoj. Laŭ tiaj tendencoj, ĉio granda estas pli bona, la novaj spertoj eble ŝajnas bagatelaj kaj negravaj. Tamen, pli ol malpli frue, oni defios tiujn pratipojn /dogmojn.

Membroj de la movado Y4UW (*Youth for a United World* / Junularo por Unuiĝanta Mondo) prezentis la projekton “Homaro sen Malsato” – lanĉita kunlabore kun **FAO** – Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Nutrado kaj Agrikulturo. Ignace Schops, direktoro de RLKM (Regiona Pejzaĝo de Kempen kaj Maasland) montris, kiel urĝa estas kunlaboro por savi nian planedon. Parolante pri diversaj ekosistemoj, li prezentis sian modelon kiu celas ligi homojn kun entreprenoj kaj politikon kun la naturo. Lia modelo nomiĝas “Rekunigo” kaj vekis internacian intereson. Ĉiujn artikolojn vi trovos, kiel kutime ĉe: https://familiaro.com

---

Kanto pri lingvaj baroj

Finiĝas la 2019a, deklarita kiel **Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj**. Pri lingvaj komplikaĵoj traktas tiu ĉi kanto: knabo renkontis en Parizo junulinon. Ambaŭ uzis nur siajn denaskajn lingvojn, ne parolis Esperanton kaj – kvankam ŝatis unu la alian – ili ne povis interkompreniĝi.

Unue kantis ĝin muzika grupo el Nederlando, la artistoj estis nur iom pli ol 15-jaraj, kio videblas en la filmeto – (3:16) https://www.youtube.com/watch?v=ZoW9T8nOCIE. En la kompleta artikolo, ni aldonis la du-lingvan originalon (franc-germana). Poste ĝin sekvis variaĵoj en aliaj lingvoj.

Soifo vivi sekure

Iu diris malice, ke ni facile toleras alies malfeliĉon. Tial do la "monda opinio" jam ne plu nutras publikojn per la samaj kruelaĵoj en Sirio, ĉar oni jam alkutimiĝis al tio. Necesas trovi aliajn ekscitajn temojn. Dume urĝan helpon por tiu suferanta nacio organizas diversaj organizaĵo kaj movadoj, inter ili Agado por Unuiĝanta Mondo – AUM (*Action for a United World*).

La fremdlanda interveno kaj (meze de aprilo 2019) bombado pluajn mortojn kaj iĝis la objekto de internacia konsterno.

En **Sednaya** (40 km de la ĉefurbo Damasko) okazis renkontiĝo de fokolaranoj kun siriaj familioj. Oni povis aŭdi atestojn pri doloroj, sentoj de perdo kaj funebro, tamen super tio ekvideblas la riĉeco de siriaj kulturo kaj tradicio. Aperas la kortuŝe impresa deziro rekonstrui sian ruinigitan landon.

La Torĉo / kun sporto al sano

Somere 2020 okazos la 32-a Somera Olimpiko en la japana ĉefurbo. Tokio gastigos la eventon duafoje, ĉar japanoj organizis ĝin jam en jaro 1964.

Tiam unu el plej sukcesaj atletoj estis **Peter Snell**, kiu mortis preskaŭ 80-jara, ĵus antaŭ kelkaj semajnoj. En Tokio li venke trakuris la distancojn de 800 kaj 1500 metroj kaj gajnis du ormedalojn. Kvar jarojn antaŭe, la 22-jara Snell akiris sian unuan ormedalon en Romo Kolektinte la tri "orojn" Snell fariĝis unu el plej sukcesaj sportistoj en la historio de atletika mondo.

Lia sporta kariero estis relative mallonga, sed ne multaj influis atletikan mondon tiel forte kiel li. Krom la tri olimpikaj ormedaloj, li rompis kvin mondajn rekordojn individue kaj unufoje en stafeto.

Krom la sportaj sukcesoj, Snell elstaras ankaŭ ali-kampe. Multaj ĉampionoj, kiam finiĝas ilia sporta famo, sentas sin konfuzitaj kaj ne povas trovi celon en la vivo. Peter Snell ne estis tia, li finis studojn kaj ĉe Universitato Massey akiris honoran doktorecon pri sporta psikologio.

Gandhi, lukte por justeco (parto 2)

Reveninte al Hindujo, Gandhi renkontis eĉ pli grandajn defiojn ol tiuj en Sud-Afriko. Unue li rimarkis, ke la situacio de virinoj estis tre malbona, ĉar ili estis traktataj kiel malpli valora parto de la socio.

Precipe kruela estis praktikado edzinigi malgrandajn knabinojn. Ili estis delonge la viktimoj de tiu socia subpremado. Gandhi asertis, ke la kutimo de infana geedziĝo estas senmorala kaj fizika malbono, ĉar detruas moralajn principojn kaj kaŭzas korpan degeneriĝon. Ŝiaj gepatroj sciu, ke ili eraras terure kiam devigas sian filinon edziniĝi tro juna.

La persista kampanjo de Gandhi rezultis fine en la Hinda Unio kaj tiu doloriga kutimo iom post iom malaperis. La sciencistoj poste rimarkis, ke infanaj geedziĝoj tre maloftis kaj procentaĵo de mortaj novnaskitaj infanetoj malkreskis. ("*Hinduism*" paĝo 185). La unuaj atingaĵoj de Gandhi estis apenaŭ preparo por la ple granda batalo por plenrajtoj de la netuŝeblaj / dalitoj. Gandhi nomis ilin Jarijans (homoj de Dio), kiu devus esti akceptitaj kiel egalrajtaj civitanoj de la socio. Li asertis, ke origino de la "netuŝebleco" komenciĝis en tre malnova tradicio, kiam oni agnoskis ke bovino devas esti honorigata kaj oni ne rajtas manĝi bovaĵon. Se iu tamen persistis fari tion, li estos ekskluzivita de la socio. La bojkoto koncernis ankaŭ liajn, infanojn (kaj iliaj estontaj generacioj).

Dum sia aktiva vivo Gandhi renkontis multajn interesajn homojn, fronte kun la merita esperantisto – Edmond Privat. Pri tio aperis libro titolita "Edmond Privat – forgesita amiko de Hindujo" (*Edmond Privat – a forgotten friend of India*), bedaŭrinde malfacile neatingebla.

Nia Vilaĝo

Homo kaj la naturo

Wallis, Futuna, Alofi kaj aliaj dudek malgrandaj insuloj en la norda Pacifika Oceano formas insularon, kiu estas parto de la francaj transmaraj teritorioj ekde 1961. Ĉi tiun regionon karakterizas ne-kutima natura beleco, bedaŭrinde difektita per rubaĵoj, amasiĝantaj jaron post jaro.

Ni purigos la insulojn

Bonŝance, antaŭ du jaroj atingis nin la eŭropoa iniciato pri “Semajno dediĉita al drasta redukto de rubaĵoj” sur la tuta kontinento (SEER). Nia Departamento pri la Natur-protektado decidis aliĝi al tiu kampanjo, unue sur malgranda insulo Nukuloa (norde de Wallis).

Al “Nia Vilaĝo” taŭgas ankaŭ iom da vintraj pejzaĝoj kaj ni prezentas ilin en la speciala novaĵletero, ĉe: https://familiaro.com .

Fortoj de la vivo

Bopatrino

Unu el miaj kolegoj plendis kiel malfacila estas vivi en familio, kiam la bopatrino ĉeestas tro-aktiva. Ŝi ne komprenas, ke oftaj miskomprenoj kaj kvereloj kaŭzas suferadon de la infanoj. Vizitante ilian domon, mi aŭskultis ilin pacience dum longa tempo kaj defendis nenies flankon. Mi volis esti proksima al ili, de tempo al tempo mi alportis kukojn aŭ aliajn donacetojn. Iutage la kolego venis al mia laborejo kaj diris: ĉio solviĝis neatendite: "*Via kapablo aŭskulti pacience fotigis min por fari la samon*". (J.F. - Koreujo)

Infana koruso

Meze de la ĉijara decembro, ni kun grupo da infanoj vizitis hospitalon en nia urbo. Ni volis al-porti iom da ĝojo al malsanuloj kaj prezenti al ili Kristnaskajn kantojn. Oni ne permesis viziti la sektoron, kie kuŝis malsanaj infanoj sed ni povis koncerti en granda enir-salono. Kiam la infanoj komencis kanti, okazis granda ŝanĝo en vizaĝoj de la gastoj, kuracistoj kaj flegistinoj. Surpri-zitaj, ili ridetis amikece. Kelkaj foriris por venigi ankaŭ la pacientojn, ankaŭ tiujn sur rulseĝoj. Parto de la publiko aliĝis al nia kantado. La hospitala personaro estis feliĉa pro la atmosfero, kiun kreis nia koruso. La impresita administracio de la hospitalo invitis ni reveni sekvontjare kaj promesis ke ni povos kanti ankaŭ ankaŭ en la porinfana fako. (L.N. - Nederlando)

Nova Urbo (New City / Città Nuova) estas internacia soci-kultura magazino eldonata de Fokolara Movado en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj kaj komunumoj, kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996.
Sekvajare ŝi prelegis en novjorka Ĉefsidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, ricevis honoran doktorecon kaj partoprenis en kelkaj internaciaj aranĝoj. Dum tiu vojaĝo okazis ankaŭ renkontiĝo de Nordamerika Fokolar-Movado kun partopreno de 2,200 gastoj el Kanado, Usono, Meksikio kaj Karaiba Insularo. Ni havis la ŝancon transdoni al ŝi peton, ke la internacia magazino *New City* / *Città Nuova* povu publikiĝi ankaŭ en Esperanto. La propono estis akceptita kaj ekde tiam aperas nia *Nova Urbo*.

Kiel vi scias, la venonta Universala Kongreso okazos en Montrealo kaj, por tiu okazo, en ĉiu numero de "NU" ni publikigos ion pri Kanado. Komence vi povas rigardi la poŝtan markon kun aŭroro - noktaj lumoj en malproksima nordo: